**NIA VOĈO**
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es
**JUL-AŬG 2010**

**FORPASIS GERARDO FLORES**
La 9an de aprilo 2010 forpasis Gerardo Flores Martín, 96-jar-aĝa, membro numero 1 de Madrida Esperanto-Liceo kaj eksprezidanto de MEL kaj de HEF.
Gerardo estis unu el la agantoj kiuj efektivigis la aĉeton de oficejo por HEF en 1971 en la centro de Madrido, kaj la homo kiu plej multe donacis al la fonduso por tiu aĉeto.
Kondolencojn al lia vidvino Antoñita.

**AMASMEDIOJ**
Estis intervjuata Toño del Barrio dum kvarona horo en la radiostacio "esRadio", la 20-an de junio, dimanĉe matene. Jen la intervjuo, alŝutita al la blogo de Rodrigo Portela:
http://es.rodriweb.com/post/717926375

Simpatia artikolo pri Esperanto aperis la 3an de julio en la regiona ĵurnalo La voz de Galicia, okaze de la hispana kongreso tiam okazanta en Santiago. Ĝia titolo "El esperanto, una lengua que intenta hermanar el mundo".
Reta ligo:
http://www.lavozdegalicia.es/barbanza/2010/07/03/0003_8589022.htm

Longa artikolo pri Esperanto aperis la 9an de julio en la ĵurnalo "Levante", de Valencio. Ĝi rilatas al la okazigo en Cheste de la Valencia E-a renkontiĝo la sekvajn du tagojn.

**EN HISPANIO**

Ĵus estis eldonita la 85a numero de la revuo **HELECO** de **Astura Esperanta Asocio**. Tial ke la nuna jaro estas Jakoba Jubileo, la ĉefa temo de la revuo estas la pilgrimado al Kompostelo kaj ties historio. Krom tiu ĉeftemo la revuo pritraktas ankaŭ aliajn aferon kun kaj sen rilato kun la E-movado.
La revuo estas alirebla tra Interreto. La ret-adreso de la enirpaĝo de nia E-Asocio estas:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/
kaj ene de ĝi, la lastaj numeroj de **HELECO** videblas tra:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/heleco.html
Konkrete, la laste eldonita numero estas rekte alirebla tra:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/85/h85.html

Faustino Castaño

**Komentoj de Lupe Sanz al la Hispana Kongreso de Santiago**
Malgraŭ la senhelpo de HEF al la LKK, la manko da informoj en la paĝaro, la pluvo de la unua tago, la amaso da pilgrimantoj en la urbo, la senflaga kongresejo, kelkaj el la prelegoj en galega lingvo, la longa nokta promenado tra la urbo por atingi trinkejon por preskaŭ 20 gekongresanoj, la manko de prelego de A. Valén… malgraŭ ĉi-tio... estis por mi unu el la plej bonaj hispanaj kongresoj kiujn mi partoprenis. Dankon al LKK kaj al Lourenzo kiel prezidanto.
La kongresejo estis bela salono kaj la afiŝoj anoncante nian kongreson estis gluitaj en diversaj lokoj de Santiago… eĉ en la enir-pordo de la katedralo. Ángel faris belegan kaj profesian desegnon.

Ni kunvenis pli ol 50 esperantistoj, multaj el ili junaj ekstremaduraj gelernatoj de Kani, kaj ankaŭ eksterlandanoj, germanaj geedzoj kiuj antaŭ la kongreso faris la jakoban anglan vojon. Elvira, kasistino de LKK, deĵoris en la kongres-budo kie disdonis, kune kun abundaj dokumentoj, belegan T-ĉemizon kaj dorsosakon.
En mia menso restos la inaŭgura prelego farita de Xesús Alonso Montero, galega historiisto pri esperanto kvankam ne parolas ĝin, la akcepto en la urbodomo kaj la foto en la balkono sur la Placo de Obradoiro, la vizito al la domo-muzeo de Rosalía de Castro kun paroloj de la direktorino kiu dediĉis sian artikolon de "El Correo gallego" al esperanto, la ekskurso tra la rio de Aurosa kun abunda bankedo de mituloj kaj vino, la vizito al la urbo gvidata tre amuze, en galega lingvo, de Gualteria Muíños kiu la sekvan tagon prelegis pri la "malbonaj" virinoj en la ikonografio de la katedralo. Kaj ankaŭ mi rememoros la viziton al la tegmentoj de la katedralo kiun mi faris kun aliaj kongresanoj jam private kaj post la kongreso.
Ni faris malgrandan pilgrimadon tra parto de la jakoba vojo ĝis la katedralo, kie ni povis vidi kiel funcias la "botafumeiro" kaj kie okazis meso en esperanto en unu el la ĉapeloj, feliĉe la movado rekaptis en Valencia al Pastro Ángel. La kultura programo inkludis viziton al Museo de la Galega Popolo, komentita de Suso en esperanto same kiel en la Pilgrima Muzeo. En la hispana oni montris la Muzeon pri Nuraj Sciencoj kaj ekspozicion pri pentraĵoj.
Mi sekvis kurseton pri la galega lingvo gvidata de Valentín, kiu estis tre interesa por mi, dum aliaj kongresanoj partoprenis en kurso de esperanto.
La LKK programis kunajn manĝojn en malmultekostaj kaj bonaj manĝejoj kiuj multe plaĉis al la gekongresanoj. Dum la adiaŭa vespero la gekongresanoj patoprenis en brul-brandon (queimada) en tre agrabla etoso kun desorĉo en esperanto.
La fermo, krom la vortoj de la prezidanto de LKK, inkludis komentojn de partoprenantoj kiuj multe laŭdis la organizadon kaj gratulis al LKK pro la bonega laboro farita.
Mi pensas ke tiu-ĉi kongreso povas esti la komenco de nova modelo por fari niajn kongresojn pli allogaj por niaj amikoj ne-esperantistoj kiuj povas vojaĝi kun ni al esperantaj eventoj.
Kaj por fini mi rakontas anekdoton: en la katedralo, en la tombejo de Sankta Jakobo, la plej sankta loko ekde mezepoko, estas komputil-ekrano plena de kandeloj kaj sube diras: *bv ne lasi monon; sendu SMS kun "Santiago01" al la numero 25000*… ĝis kie ni atingos?

Lupe Sanz

## TRA LA MONDO

La junia numero de Eŭropa Bulteno prezentas i.a. jenajn artikolojn:
Pri la situacio de esperanto en Italujo
Laborgrupo pri aktiva eŭropa civitaneco
Eŭropa federista movado kaj Esperanto
Por ke Esperanto eniru la eŭropajn organizojn
Kiel plifortigi la rajtojn de eŭropanoj
Renkontiĝo de e-verkistoj en Hraŝĉina (Kroatio)

Eŭropa Bulteno estas legebla ĉe la jena adreso: http://www.gazetejo.org/eo/node/2082

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj lundaj **konversaciaj rondoj** ne okazos dum julio kaj aŭgusto. Por sporadaj renkontiĝoj oni alvokos per la retlisto "esperanto-madride".

*************************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID